

Ĝenerala raporto de IKEF en la jaro 2021

Okaze de la 5a Komuna Konferenco de IKEF

La 6a de Marto 2022

Ludoviko ZHAO Chenghua

Vicprezidanto de IKEF






Estimataj estraranoj kaj ikefanoj,

Saluton kaj dankon al ĉiuj ĉeestantoj!

Hodiaŭ okazas la 5a komuna konferenco de IKEF , kaj en la nomo de la estraro de IKEF mi raportas al vi ĉiuj ikefanoj la pasintan laboron kaj aktivan en la jaro 2021.

La tempo flugas jaron post la jaro malgraŭ la pandemio daŭranta tra la mondo. Ekde la fondiĝo en 1985 IKEF jam pasis la 37 jarojn, kaj ĝi travivis multajn malfacilojn, sed plej malfacila momento okazis en 2021, ĉar la pandemio daŭras tutan jaron, kaj nia fizika aktivo haltas ĝis hodiaŭ. Danke al niaj estranoj, ikefanoj kaj kursanoj IKEF utiligis novan platformon virtuala



Kunveno aranĝi rimarkindajn regulajn okazojn Dimanĉaj kunvenoj (DK) , Sezonaj kunvenoj (SK) kaj AMO-IKEF seminarioj k. t. p, ĝusta-dirite ni tre bone plenumis la laborplanon de la jaro 2021 kun tri video-kunvenoj DK, SK kaj KK, dedicitan okaze de la 4a Komuna Konferenco. Jen sekvaj estas la konkretaj raportoj:

1, La landfilioj pli multiĝas kaj IKEF plifortiĝas

Estas grave al la internacia organizo, kiom da landfilioj ĝi havas. IKEF emfazas la taskon varbi novajn landfiliojn, kaj en la 25a de Julio 2021 fondiĝis IKEF-Vjetnamio en Hanojo. Ĝi plenigis la mankon de IKEF-filio

2, La video-kunvenoj okazis regule kaj ĝi akcelis aplikadon de ikefanoj kaj kursanoj

Nun estas la datuma epoko kun teknologia novigado. IKEF devas kapti la ŝancon por konstrui sian aplikan sistemon en la mondo cele por ke Esperanto povas efike servi al la internacia ekonomio kaj socia progreso. Dume IKEF establis internanjn seriojn DK (Dimanĉa Kunveno), SK (Sabata Kunveno) , KK (Komuna Konferenco) kaj publikan serion SAF (Sabata Akademia Forumo). Ĝis nun okazis 56 DK, 4 SK, 48 SAF kaj 2 distraĵ kunvenoj por la Novjaro. Ilin partoprenis ĉ. 5200 persono-fojoj.

Objektive ili propagandis pri IKEF, kaj donas al ikefanoj kaj kursanoj okazon por praktiko kaj apliko de Esperanto.

3, Komuna seminario AMO-IKEF montras al la internacia Esperantujo aktivan figuron de IKEF

Por vastigi sian influon IKEF organizis video-seminariojn kune kun UEA, ekzemple:

AM073-IKEF la 30-an de majo de 2021 kaj

AM079-IKEF la 28-an de novembro de 2021.

Ĉirkaŭ 160 homoj partoprenis la du okazojn.

La du video-seminarioj kunlaborantaj kun UEA plene montris la aktivecon de IKEF kaj ĝian valoran sperton en aplikado per Esperanto por la internacia ekonomio kaj komerco, reflektante la brilan perspektivon de la evoluo de Esperanto en la estonteco.

IKEF deziras havi pli da simialaj okazoj kun UEA

4, Esperanto-kurso “Vojaĝu tra la tuta mondo” donis al IKEF la famon kaj preparis la solidan bazon por la estonteca disvolviĝo

Por bonvenigi la kvinan jarkunvenon de IKEF, Por ke Esperanto ludas pli grandan rolon en la internacia interŝanĝo, IKEF okazigis la retkurson “Vojaĝu tra la Tuta Mondo” la 30-an de septembro ĉijare. Sume aliĝis 280 studentoj kiuj konsistas el 28 provincoj en Ĉinio, 4 studentoj el alilandoj (2 en Japanio, 1 en Bulgario, 1 en Pakistano). La okazigo de tiu ĉi kurso ne nur donis al IKEF la famon, ankaŭ preparis solidan bazon por la disvolviĝo de IKEF. Ĝi ludis pozitivan rolon por la estonta disvolviĝo de IKEF. Mi kredas, ke la disvolva vojo de IKEF fariĝos pli larĝa kaj pli hela.

5, Celebri la 162an naskiĝtagon de Zamenhof cele por plifortigi la kredon de Esperanto

La 12-an de decembro en la jaro 2021, IKEF okazigis retan celebradon por Zamenhof. Ĝin partoprenis ĉirkaŭ 104 personoj el 20 landfilioj, jen Ĉinio, SudKoreio, Japanio, Irano, Vjetnamio, Turkio, Nepalo, Brazilo, Mongolio, Kanado, Pollando KTP kaj kursanoj de “Vojaĝu tra la Tuta Mondo”. La partoprenantoj ankaŭ prezentis diversajn programerojn, ekzemple: legado, kantado, muziko, kaj dancado. Ĝi donis al ĉiuj la belan impreson kaj plifortigas al oni la kredon je estonteco de Esperanto, kaj antaŭenigas la daŭrpovon de Esperanto.

Resumo

Ĉi-supraj estas niaj atingoj en la jaro 2021, sed ankoraŭ estas multaj mankoj. Ekzemple: nia ĝenerala Esperanto-aplikado bezonas plibonigon je la nivelo kaj kvalito, kaj ni bezonas pli da landaj filioj kaj ankaŭ bezonas aktivigi dormantajn landfiliojn dum lastaj jaroj. Ni esperas, ke en la jaro 2022 la nova estraro povas forigi tiujn mankojn, kaj povos gajni pli da atingoj ol en la jaro 2021. Ni kredas ke la estonteco de IKEF estos prospera. Ni laboru kune por nia estonteco. Dankon pro via subteno!

Estraro

de IKEF